


# Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

**JARABONO :**

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

MAJO - JUNIO - JULIO - AŬGUSTO

1972 3-4

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

# KULTURAJ KAJEROJ

1972 MAJO - JUNIO - JULIO - AUGUSTO

Dumonata informada kaj kultura revuo

**REDAKCIA KOMITATO :**

**Sekretario :**

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

**Komitatanoj :**

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

**El Grésillon**

**Esperanto tra la mondo** A. Frangeul

**Silklaboristoj kaj Pasamentistoj**

**La fizikistoj, tiuj materio-kreantoj**

**Gresillon 20 jara**

**Mankisado**

**La reĝa paŝtisto** Ladislao Tihanyi

**Por via distro**

**KULTURAJ KAJEROJ**
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

**KULTURAJ KAJEROJ**
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
respondos al gramatikaj demandoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

# MIRRAKONTO

Iam naskiĝis knabineto sub la bastoneto de sorĉisto. Al ŝia lito kliniĝis multaj geamikoj, plej ofte simplaj homoj, kiuj vidis la etulinon, kiel personigon de longtempe lulata deziro. Sed ŝi naskiĝis malriĉa. Ankaŭ ŝiaj amikoj ne estis riĉaj. La povrulino estis tute nuda. Se ŝi restus tia ŝi certe mortus. Aĉeti vestojn estis neeble, ĉar la monujoj estis malplenaj. Do, ĉiu donacis al ŝi ne nur sian amon sed ankaŭ parton el siaj propraj vestoj, kovrilon, iom da lakto, iom da pano, simplajn necesaĵojn, kiuj sufiĉis por ke la knabineto ridetu. Ŝiaj ridetoj ne nur ĝojigis la fidelulojn sed ankaŭ arigis kelkajn aliajn amikojn. Por ke finfine la etulino havu siajn proprajn vestojn, ĉiuj geamikoj, unuope aŭ grupe, laboris, dediĉis multajn, multegajn laborhorojn. La rideto de la knabineto varmiĝis pli kaj pli, ĉar grandiĝis la nombro de la personoj, kiuj venis ŝin saluti, kuraĝigi, gratuli.

Ĉijare, en 1972, la knabineto estas junulino. Ŝi estas 20-jara. La sorĉisto, kiu naskis ŝin el etero, el idealo, per mensoforto kaj optimismo, mortis. Sed li tiom influis la knabineton, metis en ŝian menson tiom da forto, da kredo en idealo, da deziro al pligrandigo de la amika rondo, ke ŝi ĉiam pensas pri li, ke ŝi ĉiam respektas liajn dezirojn, ke ŝi forĵetas ĉian emon al koketeco por daŭre esti la amikino de ĉiuj, granduloj kaj malgranduloj, blank —, nigr — kaj flavhaŭtulo, kredantoj kaj nekredantoj. Certe la sorĉisto ĝojus se li vidus la senafektan, ridetantan, bonveneman, esperoplenan junulinon al kiu li donis la vivon.

La sorĉiston vi konis ; lia nomo estis Henri Micard.

La junulinon vi konas ; ŝia nomo estas Grezijona.

**NE PLU ATENDU**

Pagu vian abonon tuj.

Helpu nin per abonigo de viaj geamikoj aŭ gekorespondantoj. Ju pli kreskos la nombro de abonantoj, des pli kreskos la kultura valoro de la revuo... kaj via plezuro.

(Vidu adresojn de perantoj sur la lasta kovril-paĝo).

Por Francio : **P. BABIN,** 13, bd la Chauvinière — 44 - NANTES
Poŝtkonto : NANTES : 2 813 61

# Esperanto tra la Mondo

## LA UNIVERSALA KONGRESO EN PORTLAND

— Pli ol 600 esperantistoj el 37 landoj aliĝis al la kongreso.

— Dum tri semajnoj, antaŭ la universala kongreso, okazos, en la universitato de Portland, oficialaj kursoj de Esperanto sub la gvidado de universitataj profesoroj.

— Du Nobel-premiitoj eniris la honoran komitaton : Prof. L. Pauling kaj H. Alven.

— La lokaj asocioj de advokatoj, medicinistoj, porpacaj kaj religiaj invitis la eksterlandajn gastojn de la koncernaj fakoj al kunsidoj aŭ lunĉoj. Okazos konferenco kaj renkontoj por la junaj esperantistoj.

## LA FAKO « AŬTOMOBILO » KAJ NIA LINGVO

Por ke Esperanto ludu la rolon de moderna internacia lingvo, estas necese ke ni disponu je esperantaj tradukvortoj por ĉiuj teknikoj.

Pri aŭtomobilaj aferoj ni konsilas al vi :

— Zorge konservi la faldfoliojn de Fiat en Esperanto.

— Konservi fotokopiaĵon de la paĝo 97 de la revuo « Esperanto » de Majo 1972.

— ...konsulti la paĝojn 1274 kaj 1284 de la « Plena Ilustrita Vortaro ».

## LA ESTONTAJ UNIVERSALAJ KONGRESOJ

— En 1973 : en Beograd, 28.7 - 4.8, kun postkongreso en Ateno, en Grekujo, kaj junulara kongreso en Sarajevo.

— En 1974 : en Hamburgo (27.1 - 3.8).

## ANKORAŬ ALIAJ SOMERAJ MANIFESTACIOJ

— « Eŭropa Esperanto-Konferenco » en Vieno, 23-30 de Julio, kun ekskursoj kaj vizitoj. Skribu al Aŭstria Esperanto-movado, Batthyanystiege, Hoffburg A-1014, Vieno, Aŭstrio. Filmfestivalo estas autaŭvidata.

— La Esperantista fako T.A.N.E.F. de la socialisttendenca asocio « La Naturamikoj » aranĝos renkonton en montara regiono Maria Alm, en Aŭstrujo, 2-9 de Septembro. Skribu al T.A.N.E.F. - Naturamikoj, Stiegerg 6/22, A-1150, Vieno, Aŭstrujo.

— Mediteranea Seminario pri lingvaj problemoj por gejunuloj, en Rethimon (insulo de Kreto), 30.7 - 5.8, kun belaj ekskursoj. Skribu al Junulara Sekcio de Helena Esperanto-Asocio, Agu Meletiu, 54, Ateno-814, Grekujo.

## KREADO DE SCIENCA TRADUKSERVO DE U.E.A.

S-ro André Heck, asistanto en la Universitato de Liège, de nun zorgas pri nova servo de U.E.A. : la scienca tradukservo. Dum du jaroj, la respondeculo starigos sliparon pri la tradukitaj artikoloj kaj pri la personoj kiuj akceptos traduki.

La servo ekfunkcios plene en 1975, por interŝanĝo aŭ sendo de tradukaĵoj. La interesatoj povas de nun rilati kun S-ro Heck, 49, rue du Chéra, B-4000 Liège, Belgujo.

## NOVAJ LIBROJ EN ESPERANTO

— « La Dolĉa Franclando » de Pierre Delaire. Agrabla kaj interesa legaĵo pri la francaj belaj lokoj kaj monumentoj.

— « Retoriko » de Ivo Lapenna. Libro nepre leginda de ĉiuj seriozaj personoj kiuj deziras taŭge informi kaj dokumenti la publikon pri la internacia lingvo. Temas pri dua pligrandigita eldono. La 294 paĝoj ankaŭ multe instruas...

— « Laŭtema vortaro esperanta-angla-franca-hispana » de Prof. Adan Hrynkiewicz (90 temoj, 234 paĝoj).

— « La tuta Esperanto » de Henrik Seppik. Dua eldono de bonega verko depost longe elĉerpita : gramatika manlibro por progresintoj kaj gvidilo por kursestroj, verkita en populara kaj klara maniero.

— « Trans la fabeloceano » de Ferenc Szilagyi. Reeldono de unu el la unuaj verkoj de Szilagyi, kiu mortis en 1967. Temas pri originalaj fabeloj.

— « Suno kaj pluvo ». Originala novelaro de Gudrun Riisberg.

— « Kuŝanta tigro ». 14 mallongaj noveloj de la estona verkistino Lilli Promet. Traduko de Alma Lekko.

## NOVAJ STRATOJ « ESPERANTO » KAJ « ZAMENHOF »

Nova strato en Manheim ricevis la nomon « Zamenhof » kaj oni anoncas stratojn « Esperanto » en Padovo kaj Parmo, en Italujo, kaj lastatempe en Brazilo kaj aliaj landoj.

Ĉu via loka klubo jam agadis tiucele ? Jen efika, konstanta, kaj... senkosta propagando por nia lingvo !

## OFICIALA AKCEPTO EN PARIZO... PREZIDENTO JONAS RENKONTIS ESPERANTISTOJN

Dum la oficiala vojaĝo de la Prezidento de la Aŭstria Respubliko en Parizo, S-ro Franz Jonas, tiu lasta bonega esperantisto, akceptis en hotelo Grillon, delegacion de francaj esperantistoj.

## ESPERANTO EN RADIO

Ĉu vi aŭskultas la esperanto-dissendojn en Esperanto ? Bonega rimedo por perfektiĝi ! En la revuo « Esperanto » de Aprilo, sur la paĝo 77, aperis la kompleta programo.

Nepre skribu al la stacioj por « vivteni » tiujn dissendojn.

# Silklaboristoj kaj Pasamentistoj

En nia tempo, ĉiutage, plej perfektigitaj mekanikoj, kiujn elektronaj gardistoj vigle atentas, liveras milojn kaj milojn da metroj de teksaĵoj el plej diversaj substancoj.

Tamen en Lyon kaj Saint-Etienne artistoj, kun senfina pacienco, pluvivigas la manan silkteksadon. La ligna trabaro de la solidaj iamaj teksiiloj montras la patinon de la multaj generacioj, kiuj, unu post la alia, ilin funkciigis ; kun la sama perfekteco la nuntempuloj interplektas kun oro kaj arĝento la silkajn mirkolorajn fadenojn ; el iliaj manoj eliras nepereemaj mirindaj ĉefverkoj. Nune, sub la fingroj de la silklaboristoj de Croix-Rousse (Rufa Kruco) naskiĝas tapetoj dediĉitaj al Kastelo Fontainebleau por la « Ĉambroj de la Reĝinoj ». La kvar paneloj menditaj de la Ministrejo pri Kulturaj Aferoj estas 3,38 m longaj kaj 0,75 m larĝaj. Ilia temo pri muzikinstrumentoj estas komponaĵo de Philippe de Lasalle ; Majstro li estis inter la desegnistoj pri lionaj silkteksaĵoj en la XVIII-a jarcento. Simile al la tapiŝo-Kartonistoj de sia epoko li antaŭvidis multajn kolorojn : 112 ili estas.

En Lyon oni teksis kaj ankoraŭ teksas por la Brita Reĝa Familio, por la franca Deputitarejo, por la urbodomaj salonoj de Parizo kaj Liono, por la Liona Prefektejo, por la Palacoj Louvres, Trianon, Versailles.

Lanta estas tiu ellaborado, kaj eksterordinare malfacila kaj detalema, laŭritme de 7-8 centimetroj potage.

La nura prepar-laborado bezonis 5 jarojn. Unue estas la tre longa « Kartigado » ; temas pri grandigo de la originala desegno : sur « milimetreca » papero oni, sub tre forta lampo, per leĝera peniko, indikas ĉiujn kolor-makuletojn. Poste venas la « legado » de la desegno kaj tratruado de la kartonoj : 150 000 kartonoj, kiuj, sur la teksiilo, ekzakte montras la diversajn elementojn de la « Karto ».

Kaj oni preparas la silkon ; estas la nura fibro uzata por la veftoj kaj por la varpo. Multaj tinkturadoj estas necesaj por havigi la 112 kolorojn de la baza dokumento.

Lasta kontrola operacio : teksado de la eltiraĵoj : ili estas teksaĵaj prototipoj, kiuj permesas kontroli la ekzaktecon de la veftaj desegnoj kaj koloroj.

Ellaborado de tiaj ĉefverkoj postulas senĉesan atenton kaj grandan paciencon. La du brakoj kaj la dekstra gambo funkciigas la teksiilon. Estas la malantaŭaĵo de la silkaĵo, kiu prezentiĝas sub la okuloj de la silkteksiisto ; la antaŭaĵon, li vidas en spegulo, sur kiu li povas tuj kontroli okazan eraron aŭ akcidenton. Plej delikata operacio estas ŝanĝi la kolorojn sur la veftoj. « Kantro » portas 600 bobenojn ; ĉiu fadeno obeas apartan ekilon ; la varpo entenas 9780 fadenojn.

La silklaboristoj posedas ne nur artistajn emojn sed ankaŭ teknikan kompetentecon. Ili estas pli kaj pli raraj ; proksimume unu dekduo en Liono.

## PASAMENTISTOJ

Saint-Etienne estas ĉefurbo de la pasamentistoj ; sed en ĝiaj ĉirkaŭaĵoj (en departementoj Loire kaj Haute-Loire) la metiistoj havas hejme propran teksiilon. En 1970 oni nombris 1603 teksiilojn kaj 803 laborej-estrojn. Saint-Etienne mem estas fama pro siaj rubandoj. Sur la iamaj Jacquard-teksiiloj floras multvaloraj brokitaj rubandoj el silkaj, oraj kaj arĝentaj fadenoj. Oni ilin eksportas Germanion, Usonon, Italujon, Britujon, Japanion, kie ili estas senrivalaj.



## VELURO SUR SATENO

Lerta uzado de razilo aperigas sur la sateno dolĉajn velurajn florojn. Antaŭ 8 jaroj, Staron kaj liaj 6 lertaj laboristinoj ornamis la edziĝrobon de Princino Beatrix per veluraj tulipoj. Tiu metiista tekniko remodiĝas kaj jam 20 laboristinoj kapablas krei tiun delikatan teksadon : « veluro je sabro ».

Paralele naskiĝis plej diversaj galonoj por littukoj, vestoj, meblaro. En tiu fako industriiĝo montriĝis necesa por fronti la necesan produktivecon. Sed virinaj manoj ne estas anstataŭigeblaj en la ornamado de la galonoj por alkudri franĝojn, kvastojn.

La industriistoj disponas 1 500 kolorojn inter la plej lastmodaj ; ĉiu fadeno estas tinkturita kaj tio donas grandan perfektecon al la ellaboraĵo. La riĉaj meblaraj galonoj adaptiĝas al ĉiu stilo kaj plej diversaj estas la uzataj fibroj : naturaj (sisalo, juto) aŭ sintezaj.

Pasamentado postulas senĉesan adaptiĝon al la evoluanta tekniko kaj al la ŝanĝiĝanta modo.

Komence de la jarcento Vital Louison fabrikis nur la Nigran Rubandon (el sateno, el fajo, el tafto), kiu pompe ornamis la tualetojn kreitajn de Boldini : 10 metroj estis necesaj por la robo kaj samkvanto por la ĉapelo.

Post la Unua Mondmilito koloro aperas. Post 1932 li fabrikas precipe « strian rubandon » kaj ŝtofon por ĉapeloj.

20 jarojn pli poste la virinoj forlasas la ĉapelojn kaj Vital Louison sin turnas al mercero : galonoj por kovriloj kaj tolaĵoj. Pli poste li faras rubandojn por la floristoj.

En 1965 aperas la « rufleto » (krispiĝanta rubando) por la vualaĵoj : ĉiumonate : 800 000 metroj de « rufleto » el tergalo. En 1968 jen novaĵo : la adhera rubando por meblaro.

Aŭtomatigo ĉiam pli perfektiĝas : la teksiiloj estas sen naveto, la rubandoj el Rhodia-sateno estas sen randaĵo, pro varmo-tranĉado de la sateno teksiita laŭ larĝo je 120, 160 cm. Aliaj fabrikadoj naskiĝis : nilonaj ŝtofoj, ĵerzo, skarpoj, sintezaj feloj.

Estantece la maŝinoj pli kaj pli malaperigas la manlaboron. Sed en Lyon kaj Saint-Etienne silklaboristoj kaj pasamentistoj konservas la iamajn tradiciojn. La silkaĵa arto la plej rafinita daŭre pasas en la homa mano.



# La Fizikistoj, tiuj Materio-Kreantoj

La Fizikistoj faris potencan strebadon por starigi klasifikon de la elementaj partikuloj. Tiu klasifiko montras la fortan rilaton, kiu ekzistas inter ilia maso kaj iliaj diversaj proprecoj.

Oni povas ankaŭ grupigi la fizikistojn en du kategorioj : la optimistaj kaj la malserenaj. Oppenheimer apartenas al ambaŭ, pro sinsekvaj sincerecoj ; li tion naive konfesis. Kiam oni proponis al li la problemon pri nuklea bombo, li kelkfoje cedis al la volupto de la serĉado ; malmobilizita, li fariĝis kontestanto.

Hodiaŭ Profesoro Schwartz, kiu instruas en Berkeley, videble apartenas al la dua kategorio. Li jus skribis al Nobel-Komitato, por ke tiu ĉi ne atribuu la Fiziko-Premion dum oni ne estos certa, ke la malkovroj en tiu medio estos bonfaremaj por la homaro. Estas tiu bonfaremo, kiun Nobel intencis rekompenci.

Kontraŭe, Sinjoro Jean Debiesse, Direktoro de la Instituto pri Nukleaj Sciencoj kaj Teknikoj en Saclay, videble opinias, ke Fiziko estas « freŝa kaj gaja », kaj ke pri Fisio kaj Fandiĝo, la estonto « povos kanti ».

Bone estas mediti pri tiuj du voĉoj.

---

En Bayonne S-ro Debiesse raportis pri la kreantaj perspektivoj de la nuklea energio. Laŭ li, nia erao estas precipe nuklea, elektronika, kaj spaca ; elektroniko jam liveris al ni instrumentojn taŭgajn por prospektorado, telekomunikado kaj inform-esplorado. Ili enorme multobligas niajn scio-rimedojn. Astronaŭtiko malfermas la trian dimension, ĝis nun nealirebla (se oni esceptas la maldikan atmosferotavolon, en kiu rampas la aviadiloj).

Pri la subnuklea fiziko, kiu sondas la ekstremajn bazojn de la Materio, ĝi estas la fundamenta scienco, la motoro de la scienca kaj teknika revolucio, kiu disvolviĝas sub niaj okuloj ; estas en tiu fundamenta serĉado, ke S-ro Debiesse precipe vidas la manon de la Kreanta Homo.

## 1 300 NOVAJ KERNOJ

Hodiaŭ la moderna fizikisto plenumas la revon de la alkemiisto : li scias krei ĉiajn novajn elementajn korpojn. Jam de longe ni intuiciis vivi en medio de atomoj, kies dimensioj estas ege malgrandaj. Ni malkovris, ke tiuj atomoj, kiuj nombriĝas je miliardoj kaj miliardoj en unu kuba metro, entenas centran nukleon ĉirkaŭitan de tavoloj de elektronoj (la plej etaj elektraj ŝarĝoj konataj).

Ĝis komence de nia jarcento la Homo sciis ekspluati la Materion nur nivele de tiuj atomaj periferiaj tavoloj, kiuj estas responsaj je la molekula aranĝo. La tuta Kemio estas la arto, dank'al kiu oni agas sur tiuj elektraj ligadoj.

Pli proksime al ni la fizikistoj sukcesis agi sur la nukleoj-mem. Ili malkovris pli ol 300 specojn da ili (dum la kemiistoj konis nur 90 elementajn korpojn) ĉar estas 2 tipojn de natura hidrogeno, kelkajn ferojn K.T.P. ... kiuj estas nedistingeblaj por la kemiistoj.

30 el tiuj nukleoj estas nestabilaj : ili lante diseriĝas. Tiu fenomeno rivelis al ni la naturan radioaktivecon. Tiu nestabileco de la materio iom ĉie montriĝas : en nia korpo okazas, ĉiusekunde, ĉirkaŭ 7.000 radio-aktivecaj eksplodoj.

Tiuj nukleoj, kiuj spontane diseriĝas, indikis, ke la Naturo havas strukturojn ankoraŭ pli subtilajn. Oni scias igi ilin nestabilaj kaj ilin transformi. Oni sukcesis krei pli ol 1.300 pluajn nukleojn, kiuj ne ekzistas en nia natura ĉirkaŭaĵo. Nu, la moderna fizikisto plenumis la revon de la alkemiisto ; li scias efektivigi ĉiujn eblajn transmutaciojn, eĉ fabriki — multekoste — oron. Tial, hodiaŭ, oni konas 10 specojn de fero kaj 19 oro-nukleojn. Tiuj transmutacioj fariĝis ordinaraj praktikaj industriaj realigoj.

Sed tiu aventuro kondukis la fizikiston multe pli malproksimen. Prilaborante la nukleon li malkovris novajn fortojn, precipe la forton, kiu cimentas la partikulojn kaj ekigas energiojn milion-foje pli grandajn ol tiuj, kiujn oni trovis manipulante la periferajn elektronojn, okazigantajn la kemian ligadon de la atomoj.

## IDEALO : LA SUNA KALDRONEGO

Ja, ĉiu tion scias de post la unua atoma fungo, sed hodiaŭ la ekspluatado de la nuklea energio pere de kontrolita fisio estas multe uzata. Unu kilogramo de uranio-235 povas liveri termikan energion korespondantan je tiu de 2 600 tunoj de karbo.

Tamen la suna kaldronego proponas al ni alian tipon de transmutacioj : la reakcioj ĉe la fandiĝo de la hidrogeno-kernoj havigas energio-kvantojn 100-foje pli fortajn ol tiuj produktitaj ĉe la fisio. Ideale estus uzi, je nia profito, samtipan reakcion. Ankaŭ ĉi tie S-ro Debiesse estas optimista. Laŭ li, ni baldaŭ scios krei tiun artefaritan kontrolitan fandiĝon.

Plej rafine montriĝas la elektronaj teknikoj en alia ekspluatata sektoro : tiu de la radio-aktivaj « strekiloj ». Dum ilia mutacio la atomaj kernoj eldonas radiadojn, kiujn oni scias kapti kaj rekoni. Oni sukcesis uzi tiujn radio-elementojn serve al biologio, medicino kaj agrikulturo. Oni enigas ilin en organismojn, kie ili estas veraj buoj eldonantaj signalojn, kiuj permesas kontroli malfacilan reakcion.

## MENDELEIEV-TABELO POR LA PARTIKULOJ

Certe la plej mirigantaj novaj perspektivoj estas proponitaj, hodiaŭ kiel hieraŭ, de la Fundamenta Serĉado. La nukleaj teknikoj konfirmis, ke la Materio povas vaporiĝi sub formo de Energio kaj reciproke, ke Energio povas transformiĝi en Materion. Rompante atomajn nukleojn per bombardado (la bombardiloj estas aliaj partikuloj ekcese akcelitaj) la specialistoj malkovris proksimume (kaj provizore) 200 lastegajn partikulojn, kiujn ili entreprenis kalsifiki laŭ iliaj afinecoj kaj iliaj simetriaj proprecoj.

kiel faris Mendeleiev pri la kemiaj elementoj.

Tiu klasifikado, pli kaj pli subtila, nepre celas aperigi la elementan ordon, la leĝojn pri strukturado kaj transformado de la Materio, ĉe ĝia plej fajna nivelo.

Ĉe tiu nivelo de la elementaj partikuloj ni estas proksimume ĉe la Mendeleiev-erao ; ni plenigas la malplenajn fakojn, ni retrovas la partikulojn, kiuj mankas en la tabelo.

## FABRIKI MONSTRAJN ATOMOJN

Helpe de novaj elementaj materialoj, kiujn li produktis, la fizikisto ankaŭ sukcesis fabriki atomojn, kies modelo ne estas en la Naturo.

*Ekzemple :* la monstraj atomoj de « muonika » hidrogeno : la periferia elektrono estas ĉi tie anstataŭigita de partikulo : la « muono » multe pli peza, sed kiu, kurioze, havas la samajn karakterizaĵojn.

Tiu « muonika » fiziko — kun ecoj multe pli reakciaj — povas esti ellaborita. Sendube ekzisto de tiuj atomoj estas, laŭ nia vidpunkto, tre efemera, sed ĝi estas ne-neadebla.

La nuklea fizikisto povas egale modifi la klasikajn kernojn, precipa sidilo de la Materio, kaj anstataŭigi protonojn kaj neŭtronojn per partikuloj pli pezaj (lambda kaj sigma).

Tiuj perspektivoj malfermas antaŭ ni novajn fizikon kaj kemion, kie la partikuloj, kiuj konsistigas la bazon de atomo povas esti anstataŭigitaj per homologaĵoj.

En la ĉapitro de la kreanta fiziko oni ne manku elvoki Antimaterion. Estas temo malfacile parolebla, ĉar ĝi volonte malfermiĝas al ekcesa anticipo.

Tie ĉi sufiĉas memori, ke la fizikistoj scias produkti Materion ek de simpla radiado (ili parolas pri materiigo de gama-radioj).

Dum tiu operacio ili fabrikas duan tipon de Materio ŝarĝita je inversa elektro kaj kiu estas dotita je aliaj karakterizaĵoj inversaj kaj eble eĉ de antigravito.

Ekzemple : kreado de unu elektrono estas ĉiam akompanata de kreado de unu pozitono : tiu pozitiva elektrono estas la antipartikulo de la elektrono.

La fizikistoj malkovris, ke preskaŭ ĉiuj partikuloj posedas tiun misteran duoblaĵon.

Hodiaŭ ek de tiuj antipartikuloj la specialistoj komencis eskaladon de Antimaterio.

Dank'al la giganta akcelilo de Serpukhov, kiu mobilizas 78 miliardojn da elektrono-voltoj, CERN-taĉmento detektis kernon de antihidrogeno kaj soveta taĉmento detektis kernon de antiheliumo. Dum mallonga momenteto kunmeto de antiprotonoj kaj antineŭtronoj konstituis kernon de antiatomo. Fakte, en la vakuo la antimaterio devus esti tiel stabila kiel banala materio ; sed la kontakto inter la du specoj de partikuloj provokas ilian neniigon.

Tiu spegul-materio simetria je la nia malfermas perspektivojn fantastajn.

Eble ekzistas galaksioj el Antimaterio.

Tiu hipotezo permesus klarigi tiujn fabelajn energio-fontojn, detektitaj de la radio-astronomio kaj kiuj disvolviĝas en nia suna universo.

Procezo de neniigo okazigata ĉe la rekonto de du kontraŭaj mondoj permesus klarigi tiun fenomenon.

Konklude la energetikaj mesaĝoj, kiuj estas centmiliard-foje superaj al tiuj, kiujn ni konas en nia mondo estus naskiĝintaj el la frotado de tiuj du mondoj : Materio kaj Antimaterio.



Photo CERN, Genève

## VIVO DE LA GALAKSIOJ KLARIGITAJ PERE DE LA ATOMO

Nu, la hodiaŭa fiziko estas en favora situacio por renovigi niajn konceptojn devenintaj de la Asirianoj kaj de la Kaldeanoj.

Hodiaŭ la subnukleaj procezoj okazigitaj en laboratorioj desegnas la vivon de steloj kaj galaksioj ĝis ilia plej lasta stadio.

Tiel : tiuj steloj, kiuj estas ĉe sia fino kaj estas reduktitaj je aglomeraĵo de neŭtronoj (kun eksterordinara denseco, komparebla al tiu de la atoma kerno) kie la relativecaj fenomenoj incitegiĝas kaj kies Materio ŝajnas enigita en ne-revenebla fazo.

Ankaŭ ĉi tie la plej subtilaj povorimedoj de la subnuklea fiziko malfermas eksterordinarajn perspektivojn al la progresado de la scioj.

Neniam, de post la prahistoriaj tempoj — konkludas S-ro Debiesse — la homaro, dank'al sia kreema talento renkontis mutacion tiel profundan, tiel totalan, en siaj rilatoj kun la Materio kaj la ĉirkaŭaĵo.

En 1957, Nobel-Premio rekompencis Tsoung Dao Lee kaj Chen Ning Yang, devenintaj el Ĉinio, kie la teorio de Yin Yang pri la komplementeco ekzistas jam de miloj da jaroj

## GRESILLON 20 JARA

La ĉiutaga vivo en la Esperantista Kulturdomo havas tre diversajn aspektojn. Ni volas ĉi tie montri al vi per bildoj tiun diversecon. Ĉar se oni vere serioze laboras en Grésillon dum la diversaj studperiodoj, oni ankaŭ scias sin distri. Kaj por tio, la Esperantista Kulturdomo proponas al la ĉeestantoj kromajn aktivaĵojn, aŭ disponigas al ili grandan parkon kie ili trovas arbaron por promenadi, lageton por fiŝkapti, banejon por naĝi, infanĝardeno kun ludeblecoj por la geknaboj.



**La ĉefa aktivado estas, kompreneble lernado de la lingvo Esperanto.**



**Inter la diversaj kromaj aktivaĵoj, jen la korbo-farado. Sed oni ankaŭ povas fari bindarton, fotografadon, emajladon, ktp...**



En la banejo estas eblecoj por malgrandaj infanoj, por mezaĝaj, kaj por plenkreskuloj dank-al la tri diversaj apartaj profundoj.



Dum kunveno de la Administra Konsilantaro.



En la lageto estas multnombraj kaj belaj fiŝoj. Sur la insuleto estas kelkafoje multnombraj fiŝkaptistoj.



En la infanĝardeno la infanoj havas plurajn ludilojn, kaj la gepatroj havas trankvilecon.

# MANKISADO

Jam de Mezepoko la mankisado estas registrita en la brako-kaj-dorso-muskoloj de la virseksa novenaskito ; ĝi ilin ekfunkciigis sub la maŝkiraso kaj sub la ĝust-al-korpo-vesto de Hugues Capet, tute same kiel sub la jako de niaj Respubliko-Prezidentoj.

Verdire, la unua mano kisita estis tiu de Viro ; ĝi estis ŝmirita ne per ungvento sed, post la ĉasado, de lupo-sango ; ĝi estis la vila manaĉo de feŭdomastro, al kiu lia vasalo venis omaĝi, okaze de la farmigo-renovigo. Kiam la kastelmastro estis for oni kisis — respekte — la riglilon.

La dua mano kisita estis longe macerinta en incenso. La flirtado de la belaj gestoj igis ĝin elegante supla ; ĝi ne estis buĉinta apron aŭ lupon, sed Dion ĝi invitis sur Teron : estis la mano de episkopo.

La kiso de la pastro, kiun li ordinis, tiu de la fidelulo, kiun li benis estis delikate demetita, ne sur la episkopajn falangojn sed sur la ametiston de la episkopa ringo.

Jen io bona ! konkludis la Reĝoj.

La Persio-Reĝoj postulis, ke, al ili, oni kisadu la piedojn ! Pli poste la civilizitaj nacioj opiniis pli oportune, ke la lipoj haltu ĉe mezvojo.

Estis la mano de Hispanio-Reĝo, kiun oni kisadis honore al Lia Moŝta Kronado ; kaj ankaŭ okaze de la moŝtaj ceremonioj.

Tamen, sub certaj klimatoj la mankiso altiris la feron : ĝi estis fatala al Sultano Amurat-la-Unua, kiun soldato murdis, favore al tiu submetiĝo-gesto.

Post tiom da serpentumadoj laŭlonge de la kreneloj, ĉe katedralo kaj tronejoj, la mankiso, naŭzita de trablovoj, finfine descendis ĝis la Virino. De mankisado ŝi restis la titolulino ; ŝi tiel forte ĝin impresis (kiel okazas pri ĉio, kion ŝi tuŝas), ke, nuntempe, ŝajnas al ni, ke estas ŝi, kiu inventis tiun submetiĝo-simbolon.

Por esprimi sian admiron al sia Damo, kiu bone odoras, la vira vasalo, plejfeliĉa, metas sian buŝon sur haŭton, kiu estas la plej inda ĝin akcepti. Kvazaŭ pasie li mankisas... kisas... kisadas !

En la XVI-a jarcento, Montaigne mokis tiujn mankisadojn kaj serpentumajn inklinojn. Sub Ludoviko la XIII-a, mankisado furoris ! !

Jam de longe la evikciitoj estis ellasintaj sian rankoron. En sia verko « Originoj de la provinco Burgonjo », abato Sto-Juliano Balleure tiadire ĝemadis : « De kiam la reĝoj permesis, ke oni nomu ilin « Via Reĝa Moŝto », ne nur princoj sed ankaŭ ĝentilhomoj « je simpla plandumo », nobeluloj malaltrangaj, damoj misfamaj kaj fraŭlinoj « je tri-lecionoj » postulis, ke oni ilin servu reĝece. Sekve, nur restis al ni, ekleziuloj, konstati, ke neniam estis tiom da mankisadoj sed tiel malmulte da oferdonoj ».

Dume la ĝojradiaj virinoj ĝuis la pacan baton de sia koro ĝis la fino de siaj fingroj finfine honorataj !

Iom post iom ĉiu virino sopiris pri tiu honoro : de la ĵargonanta kamparanino al Sinjorino de Montespan ; de Emilienne d'Alençon, princino ĉe duonmondumo al la veraj princinoj, kiujn incendio mortigis en « Bazar de la Charité » ; de la vendistino en Monoprez-vendejo al la edzino de S-ro Direktoro de la Popola Kreditejo en Marmande ; ĉiu Virino, fronte al la kliniĝanta Viro, tronas en perpetua Amoro-Kortego.

Pitoreskaj analoj raportas pri la akcidentoj kaj la emocioj, kiujn mankisado okazis :

Jen la giganto, kiu levtiras al si la etan ulinon.

Jen tiu, kiu plonĝas al apenaŭ vidita mano, perdita en abunda maniko !

Jen la malaltulo, kiu piedfingre stariĝas ĝis la kvin krudaj fingroj de kolosulino, kaj provas ĉe ili alkroĉiĝi !

Jen la malĉastulo, kies aŭdacaj lipoj glitas ĝis la manartiko... k.t.p.

Jen la 4-jara paĝio, kiu, en altrangaj edziĝfestoj, provante siajn unuajn galantaĵojn, kisas manojn malpli purecajn ol sia frunto.

Baldaŭ abundis teknikoj kaj glosoj :

— Ĉu oni devas kisi la supraĵon de la mano aŭ nur la fingro-pintojn ?

— Ĉu oni devas kontentiĝi je nura ektuŝado de la lipoj aŭ pli respekte, nur iri renkonten al tiu mano, protektita de fajna aertavola interspaco, kaj tuj stariĝi pro pudora elklikiĝo ?

Iu diris : « La parfumo de la mano sufiĉas al mi ; mi malpermesas al mi ties kontakton ».

Maljuna galantulo precizis : « Mankisado estas ne nur geometria problemo de du kruciĝantaj trajektorioj (tiu de la supreniranta mano kaj tiu de la malsuprenirantaj lipoj), ĝi estas koncertanta simfonio mobilizanta tiom da instrumentoj kaj akcesoroj, kiom Lohengrin (li rimarkigis, ke la mankisado prenas sian fonton ĉe la brova arkado).

Sed nuntempe estas misuzoj, kiuj skandalas la purecemulojn. En « Cannes » ni vidis galantulojn, ban-kalsonet-vestitaj :

— kisi la manon de belulinoj, ĝis du-pec-ban-vestaĵo striptizantaj,

— plonĝi en la ondojn, elakviĝi... kaj denove kisi la saman manon... aŭ aliajn,

— kaj okaze de kraŭlo aŭ sunbano, fuŝfarbi la mankison per sablo aŭ salo !

Kia ofenda karikaturo ! !

— Cetere la samuloj en Megève, dum vintro, portos la mankison sur skioj kaj ĝin pudros per neĝo !

---

Nepre necesas, ke ni memorigu (laŭ la spertuloj) la tri oro-regulojn de tiu superega arto :

— Oni ne kisas gantigitan manon.

— Oni ne kisas la manon de junulino.

— Oni ne mankisas, kiam oni estas eksterdome.

Ni provu klarigi la kialojn de tiuj ordonitaĵoj.

— Mano gantigita, memore al la praaj agresoj, preparas militon : estas ĝi, kiu forĵetis la lancon ; ĉia ganto pliiganta la volumenon de la pugno estas frato de la boksoganto kaj disradias furiozon. Kompreneble, ne estas al tiu leda stomako, ke la lipoj — eĉ masklaj — dediĉos Paco-kison.

Aliparte, kaj la posteuloj de Pasteur konsentos kun ni, la ganto estas nesto por la polvoj ; la mikroboj kantonmentas sur kapridledo kaj, ja, la kisoj ne ŝatas epidemiojn.

— Kial oni ne kisas junulinan manon ?

Kompreneble, respekte al Virgeco. La omaĝo, kiun Viro tiamaniere manifestas al Virino estas amoro-omaĝo ; li subdiras : « Mi rezignas miajn sinjorajn prerogativojn ; mi abdikas antaŭ Malforteco ! » Sed junulino tronas super Amoro-omaĝoj. Vere, je ŝi oni povas honori nur ŝian animon !

— Fine, kial ne kisi manon eksterdome ?

Ĉar mankisado estas ceremonio kaj ĉia ceremonio : Edziĝo-festo, Pac-kontrakto, Reĝ-Kronado, ĉiam okazas inter muroj, sub la volboj de sanktejoj aŭ palacoj.

Ni respektu tiujn leĝojn : ni enirigu en ĝian liton kaj en ĝiajn noblajn limojn la mankisadon, kiun la ĉeval-jarcentoj heredigis al tiu de la atomo, kaj kiun la frenezula posteularo de S-ro Jourdain plej fantazie misuzas.

# LA REĜA PAŜTISTO

Tiu-ĉi historio originas el la praa Helena Olimpo.

Tiam, migranta piediranto ekiris matene el ĉefurbo de iu reĝlando por alveni en ĉefurbon de najbara lando. Okazis, ke la belaspekta viro venis al la reĝo de Pheres en Tesalio, kiu dungis lin, kiel paŝtiston.

La fremdulo tuj konkeris la korojn de la virinoj. Knabinoj, eĉ edzinoj, sole aŭ duope, ekde la mateno ĝis la nokto kaŝe vizitis la paŝtiston, kantis kaj ludis kune kun li.

La fremdulo estis bela, kiel la dio Apolono; krome, afabla, ĝoja, sprita kaj li akompanis siajn kantojn per mirakla liuto.

Vane, demandis lin la virinoj pri lia hejmo aŭ deveno. Tiam, li respondis malgaje : « Pro la virinoj mi devis forlasi mian hejmon. Estus tro dolora al mi paroli pri tiuj eventoj. Vi komprenos tion, kiam mi forlasos tiun-ĉi urbon. Ĉar, certe, iu virino okazigos mian foriron ».

Tiam, disfamiĝis en Pheres ke la reĝa paŝtisto estas mem la filo de Zeŭso, la dio Apolono.

— « Stulteco ! — diris la edzoj kaj la patroj — Pro kio Apolono venus en Pheres paŝti la ŝafojn de la reĝo Admeto ? ».

— Zeŭso sendis lin ĉi-tien por pentofari ? — respondis la virinoj.

Tio povus esti verŝajna, ĉar Apolono ofte pekis kontraŭ la belaj virinoj, diinoj, eĉ kontraŭ sia patro Zeŭso.

Ankaŭ motivis la klaĉon de la virinoj, la fakto, ke la reĝo ne traktis lin, kiel paŝtiston, sed kiel gaston kaj bonan amikon. Ofte, ambaŭ ili iris en la najbaran urbon, kaj tie, en la korto de la reĝo Peliaso.

Jam de pluraj jaroj, Admeto ekamis la reĝfilinon, kaj la junulino reciprokis lian amon. Densa, malhela hararo enkadrigis la neĝoblankan vizaĝon de Alkesta, kaj ŝiaj grandaj, bluaj okuloj estis neforgeseblaj. Jam, multaj reĝidoj estis petantaj la manon de la filino de Peliaso. Ĉar la reĝopatro ne deziris ofendi la svatantojn, ĉiam li deklaris, ke iĝos edzo de lia filino nur kiu povos kunjungi leonon kun virkapro kaj per tia stranga bestoparo traveturi la konkurejon.

Admeto petis la helpon de sia paŝtista amiko, kiu konsentis kaj foriris kun eskorto. Post kelkaj tagoj, la akompanantaro revenis kun maljunega virleono. Inter la montoj, situis mallarĝa valo ĉirkaŭita de krutaj rokoj, kiel natura areno. Tie, la fremdulo komencis malsovaĝigi vir-aprojn kunportitaj de ĉasistoj laŭ la ordono de la reĝo. Kun senfina pacienco, li sukcesis tirigi la veturilojn pere de du virkaproj. Sed, kiam sola, ĉiu virkapro freneziĝis je alproksimiĝo al la leono.

Fine, iu sorĉistino donis al la paŝtisto specialajn radikojn. Li malsatigis virkapron por plej facile manĝigi, kaj tiel narkoti la beston. Tiamaniere, la obeema maljunega leono nur sola tiris kun la jugo kaj la svenigitan virkapron kaj la ĉaron.

Admeto sukcesis rekrei la spektaklon antaŭ la kortego de Pelaso, kaj tiel gajnis la manon de la reĝfilinon.

Ĉiu sciis, ke tiuokaze, la paŝtisto helpis la reĝon Admeto fari la miraklon, kaj de tiam neniu dubis : Certe, la fremdulo estas Apolono.

Alkesta kaj Admeto rapide geedziĝis. Post la edziĝfesto, Alkesta iris en la nupto-ĉambron kaj rapide, Admeto volis sekvi ŝin. Sed, la ĉefpastro haltigis lin kaj severe admonis : « Reĝo, vi forgesis oferi al Artemisa ! » — « Faru anstataŭ mi ! » respondis Admeto.

La ĉefpastro profunde, strange rigardis en la reĝajn okulojn, kaj malrapide diris : « La oferon, nur vi mem povas fari. Rapide, vi pentos, ke tiel grave vi ofendis Artemisan ».

Tiel granda estis la deziro de la reĝo al la belega Alkesta, ke malpacience li kuris for de la ĉefpastro. Kiam li eniris la ĉambron, terurita li vidis sur la lito nur serpentojn interkroĉiĝantajn. Ĉiuj serpentoj furioze eksiblis al la reĝo. Alkesta ne estis en la ĉambro. Admeto, malespere, kuris for kaj rakontis la teruran eventon al sia amiko. La paŝtisto tuj komprenis, ke la ĉefpastro okazigis la miraklon, kaj akompanis la reĝon en la templon de Artemisa.

La reĝo donis sian oferon en peza arĝentvazo. La pastrino de la diino pardonis. Krome, interpretis ekstran favoron de la diino : « Kiam la reĝo estos mortonta, iu alia homo povos elaĉeti la vivon de la reĝo kontraŭ sia propra vivo ».

Post kelkaj tagoj, la nova reĝo-paro invitis amikojn en la palaco. Dum la festeno, Admeto rakontis pri la stranga mesaĝo de Artemisa.

— Se vere, iu devus elaĉeti mian vivon, kiu estus preta doni la sian kompense ? Ĉu mia patro aŭ mia patrino konsentus morti anstataŭ mi ? Certe, ne. Eĉ ili ne farus tiom.

— Tiam, mi irus viziti la Parcojn — ridete diris la paŝtisto, kaj per bona vino ebriigus Atropa. Ankaŭ la tri Parcoj estas virinoj, ĉu ne ? Kaj ĝis nun korojn de iu ajn virino mi povis konkeri per sperto kaj pacienco. Se Atropa ebriiĝus, ŝi ne povus fortranĉi la viv-fadenon de mia amiko.

La gastoj ekteruriĝis, ĉar ĉiu timis la famajn maljunulinojn. Nur Alkesta diris kviete.

— Volonte, mi donus mian vivon kontraŭ la via, ĉar mi ne povus pluvivi sen vi.

Ŝi diris tion kun tiel granda amo, ke Admeto, prave, kredis al ŝi.

Post kelkaj semajnoj, foje Admeto vizitis la paŝtiston. La vespero estis milda. Sub granda arbo brulis fajro, kaj ĉirkaŭ la fajro sidis la paŝtisto kun kvin virinoj. La fremdulo gratis la liuton, kantis, kaj la virinoj, ravitaj, aŭskultis lin. La reĝo, silente, sidiĝis apud la arbotrunko. Gaje kaj distriĝeme, li observis la amstreĉitan etoson de la grupeto.

— Ĉu vi scias kiamaniere Apolono konkeris La nimfon Driopa ? demandis la paŝtisto ; kaj post nelonga silento aldonis : « Tiam Apolono transformiĝis en belegan testudon ». La amikinoj de la driado ludis kun la testudo, sed kiam la driado prenis ĝin sur sian sinon, tiam la testudo iĝis serpento. La nimfo svenis. La amikinoj forkuris, terurigitaj. Tiam Apolono reprenis sian viran korpon kaj ekposedis la knabinon.

La reĝo, ridete, rigardis la ravitajn vizaĝojn de la virinoj, kiam la paŝtisto detale priskribis tiun ekposedon. Ili ŝajnis imagi kaj travivi la situacion.

Poste, la virinoj konkuris, kaj la gajnantino foriris kun la paŝtisto « observadi la stelojn » La aliaj virinoj kantis en ĥoro. Tiel paca kaj kvieta estis la vespero ke Admeto forgesis la tempopason.

Rideme, li revenis hejmen.

— Kie vi estis ? — demandis Alkesta.
— Mi vizitis mian paŝtiston — respondis Admeto.
— Mia kara edzo, ĉu mi povas peti ion de vi ?
— Jes, kompreneble. Ĉion vi povas peti de mi.
— Sed, ĵuru, ke vi plenumos mian deziron.
— Mi ĵuras ! — asertis la reĝo.
— Do, promesu al mi, ke morgaŭ vi forsendos poreterne vian paŝtiston.

La koro de la edzo iĝis tre peza. Tamen, li silentiĝis ekĝemon kaj diris : Estu laŭ via deziro. Morgaŭ matene li foriros.

---

Laŭ la greka legendo, reverkis Ladislao Tihanyi.

# POR VIA DISTRO

## AMUZAJ PROBLEMOJ

### Solvo de la antaŭa problemo

Ekzameno

Jen la historiaj personoj kiuj diris la frazojn cititajn en la lasta numero de Kulturaj Kajeroj.

1) Reĝo Salomon, en la libro « La predikanto ».
2) Julio Cezaro, antaŭ ol li transiris la Rubikonon.
3) La franca reĝo Henriko la IV-a.
4) La lastaj vortoj de la greka scienculo Arkimedo, al la roma soldato lin mortiganta.
5) La germana kanceliero Otto von Bismark.
6) Alexandre Dumas la patro.
7) Jesuo Kristo, en la biblio.
8) La angla reĝo Edvardo la III-a, fondinto de la Ordeno de la Ŝtrumpligilo.
9) James Monroe, la 5a prezidanto de Usono.
10) La franca poeto Desbarreaux.

## NOVAJ PROBLEMOJ

KRUCVORTOJ



*Horizontale*

1 — Juvelo en formo de plata skatolo.
2 — Parto de la inaj seksorganoj. Ofende.
3 — Mamulo kun longaj oreloj.
4 — Pli ol sufiĉe. Instrui beston.
5 — Radioaktiva elemento. Aŭdebla aervibrado.
6 — Infano (R). Malgranda (R). Azia trinkaĵo (R).
7 — Kaŭzanta morton (R). Veni returne (R).
8 — Tuto necesa por labori (R). Guto de saleca likvaĵo (R).
9 — Ago flati.
10 — Sufikso. Tempomezurunuo. Prefikso montranta parencecon.

*Vertikale*

1 — Multobligi.
2 — Libera spaco super la nuboj. Movo por salti (R).
3 — Io valora kiun oni lasis ĉe iu (R).
4 — Sufikso esprimanta kolekton. Posteularoj.
5 — Titolo de iaj altfunkciuloj en Britujo. Artikolo.
6 — Multvalora metalo (R). Genro de mevoj (R).
7 — Sufikso montranta kolektivecon. Tribuno.
8 — Akva feo. Elementa peceto.
9 — Nombro. Nepublika (R).
10 — Interjekcio. Skandinavia monero (R). Nedifinita pronomo.

---

(R) = nur radiko.

—★—

## ENIGMO

1. La naskiĝjaron de Zamenhof multobligu per la naskiĝmonato.
2. Al la ricevita sumo aldonu la mortojaron.
3. La sumon dividu per la naskiĝtago.
4. La rezultaton multipliku per la mortotago.
5. Aldonu la jaron de la apero de Esperanto.
6. La sumon obligu per la mortomonato.
7. Deprenu la jaron de la unua universala kongreso de Esperanto.
8. La ricevitan nombron obligu per la nombro de liaj infanoj.
9. Deprenu la numeron de la kongreso de Esperanto de 1959.
10. Dividu per la nombro de la pintoj de la verda stelo.
11. Deprenu la nombron de la filoj de D-ro Zamenhof.
12. Dividu per la nombro de liaj filinoj.
13. Deprenu la nombron de liaj geavoj.
14. Dividu per la nombro de la gramatikaj reguloj en la « Fundamento de Esperanto ».
15. Aldonu la nombron de la kontinentoj, en kiuj Esperanto estas parolata.
16. Dividu per la nombro de la koloroj en la esperantista flago.
18. Fine aldonu la nombron de la literoj en la unuaj du linioj de la poemo de Zamenhof « Al la fratoj ». — *Kiel finrezultaton vi ricevos faman nombron, kiu estas konata el la mondliteraturo.*

## DE LA REDAKCIO

Ni ricevos kun plezuro ĉiujn problemojn kiujn vi bonvolos sendi al ni (ĉu literaj, ĉu numeraj, ĉu krucvortaj problemoj), kaj aperigos ilin laŭ la eblecoj inter niaj Amuzaj Problemoj.

# GRAMATIKO PER BONHUMORO

**Konserva de O-finaĵo**

1) **por belsoneco**
majstro-verko ; arbo-branĉo ; kudro-maŝino

2) **por klareco de la senco**
diosimila ; luodomo

3) **por eviti konfuzon**
feokanto (fekanto) virotemo (virtemo)
orodono (ordono) inoformo (informo)



**Dilemo :**

Plej miregiga estas pensi, ke ili estas de la sama artisto ! Mi intencas doni al mia edzino, de kiu mi ricevas tiom da edzinaj kontentigoj, unu el tiuj artaĵoj. Tamen mi hezitas... Edzino-kontentigo estas tiel delikata afero !



**Kara Samideanino :**

Por ĝoje festi Novan Jaron mi invitas vin hejmen. Mi preparis por vi juvelojn perlamotoriĉajn. Mi montros al vi mian kolekton pri konkaĵoj. Kaj ni festenos per plej variaj konkoj.
Kompreneble ne timu, ke tiu konkoludo konduku nin al nehonesta konkludo !



**Marŝaĵoj !**

« Kristnasko-Patro » el Marso ĵus elfuzeiĝis en nian halon. Kun plezuro li prezentos al vi, karaj infanoj — kaj al vi modernaj gepatroj —, la tieajn plej mirigajn ludilojn kaj kreaĵojn !

# Niaj perantoj

**Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).
**Belgujo** : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).
**Britujo** : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).
**Ĉeĥoslovakio** : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).
**Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE.
**Finnlando** : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).
**Germanujo Okc.** : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (6,2 mk.).
**Hispanujo** : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).
**Italujo** : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).
**Japanujo** : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).
**Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).
**Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).
**Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.
**Peruo** : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).
**Pollando** : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.
**Rumanio** : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6. (27 lei).
**Sovetunio** : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.
**Svedujo** : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).
**Svislando** : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE.
**Tajlando** : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).
**Usono** : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).
**Aliaj landoj** : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.




## KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

## ESPERANTISTA KULTURDOMO

**De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn**

***Akceptas :***

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

## *VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO*

**Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :**
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo


Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN.

*Supplément au n° 3-4 de 1972, de « KULTURAJ KAJEROJ »*

# LA VIE DE GRÉSILLON

## ENTRE NOUS...

La saison sera bonne. Les participants seront nombreux. Depuis Pâques les passages ont donné bien du travail à M. et Mme Ciret qui se sont dépensés sans compter, et, grâce à eux, un nombre appréciable de groupes a pu être hébergé. Pour son vingtième anniversaire la M.C.E. reçoit de nombreuses marques de sympathie. Son renom s'est encore étendu et cela est, bien sûr, très encourageant.

Nous espérons que l'aménagement de certaines chambres, que nous comptons poursuivre, plaira à nos amis. Qu'ils y voient un désir de leur plaire et de leur apporter un peu plus de confort. Qu'ils pensent aussi que tout cela n'a pas été fait par des spécialistes, mais que de nombreuses heures de travail anonyme ont été nécessaires. Il semble que, pour Grésillon, certains trouvent encore des heures d'activité en dehors des 24 que chaque jour met à notre disposition.

Et déjà nous pensons à l'an prochain. Une part des bénéfices sera consacrée à l'aménagement du château, une autre à l'achat de matériel, ou à son remplacement (il nous faut un nouveau système de filtrage de l'eau). Nous espérons qu'il nous restera une somme pour notre grand projet : la salle de conférence. Nous serons aidés par l'Association Culturelle du Château de Grésillon qui a déjà reçu de très nombreuses adhésions. Nous aimerions que, pour son 20e anniversaire, la M.C.E. voit se développer un grand mouvement d'amitié qui lui permettrait dès sa 21e année de mettre à la disposition des espérantistes une installation digne d'elle et digne d'eux.

P. BABIN.

# Réunion du Conseil d'Administration du Dimanche 2 Juillet 1972

Présents : MM. et Mmes Babin, Bénistant, Boyet, Cheverry, Ciret, Coussé, Dairon, J.-P. Guillot, Jelenc, Métivier, Micard.

Excusés : MM. et Mmes Benazet, Bodereau, Chevalier, P. Jacquesson, Mathé, Philippeau.

## STAGES PASSES

M. Jelenc, rendant compte de la première semaine de Pâques, souligne l'excellent déroulement de ce stage.

En ce qui concerne la semaine culturelle, organisée, cette année, par J.E.F.O., M. Babin note de bons aspects et d'autres moins bons. Il évoque la nécessité, au cours de chaque stage non organisé par la Maison elle-même, de bien préciser les domaines des responsables du programme culturel, d'une part, et des responsables administratifs, d'autre part. Ces derniers doivent pouvoir pleinement assumer leur rôle dans l'esprit propre à la M.C.E.

Les divers passages qui ont eu lieu depuis les vacances de Pâques sont ensuite passés en revue. Ces passages, qui apportent une aide financière importante pour la M.C.E., provoquent aussi un très gros travail pour M. et Mme Ciret, et le conseil d'administration est unanime pour les remercier très chaleureusement, et pour rembourser les frais élevés qu'entraîne leur précieuse collaboration.

Les divers groupes ainsi reçus doivent tous être adhérents à l'Association Culturelle du Château de Grésillon. Pour cette année, chaque groupe verse, dans son paiement de séjour, la cotisation simple de 5 F., et cette somme sera versée, en fin de saison, par la M.C.E. à l'A.C.C.G. La M.C.E. percevra une cotisation de groupe si l'A.C.C.G. détermine une telle cotisation.

Mme Micard donne lecture de propositions écrites de M. Bodereau concernant l'indemnité du président et l'indemnisation de ceux qui transportent les espérantistes entre les diverses gares et le château. L'indemnité du président ayant été réajustée il y a quelques années et étant jugée suffisante par M. Babin, la discussion porte sur la deuxième proposition. Le conseil d'administration pense qu'il n'est pas possible d'indemniser les chauffeurs bénévoles qui transportent les espérantistes venant à Grésillon pour des raisons d'assurance.

## STAGES D'ETE

M. Babin fait un très rapide survol des stages de l'été qui, tous, auront une participation importante. En ce qui concerne le symposium organisé pendant la quinzaine internationale à l'occasion du vingtième anniversaire de la M.C.E., le conseil d'administration regrette qu'un certain nombre d'associations internationales n'aient pas cru devoir répondre à l'invitation de la M.C.E.

## 20e ANNIVERSAIRE

Afin de marquer le vingtième anniversaire de la Maison Culturelle, le conseil d'administration envisage, pour chaque stage, une journée destinée à fêter cet événement pour les participants. D'autre part, une réception des personnalités de la région est prévue pour le jeudi 27 juillet.

## TRAVAUX

M. Babin rappelle que des chambres ont été améliorées.

Il évoque ensuite le problème de l'alimentation en eau, le filtre étant hors d'usage. Le devis proposé, qui prévoit un dispositif très important, est très au-dessus des possibilités financières de la M.C.E. Une autre étude est nécessaire.

## QUESTIONS DIVERSES

Mme Micard lit une demande de M. Bodereau concernant l'amélioration du café servi à Grésillon. Cette demande est appuyée par l'ensemble des membres du conseil d'administration.

M. Babin évoque ensuite les difficultés de Mme Corvaisier, dont la présence à la cuisine pour les passages et la saison est unanimement apréciée par les personnes chargées du fonctionnement de la M.C.E. Mme Corvaisier perd, en effet, la garde d'enfants qui lui assurait un revenu fixe tout au long de l'année. M. Babin lui proposera un versement de 300 F. par mois pendant les six mois d'hiver et de 700 F. par mois pendant les six mois d'été, à concurrence de 1.300 heures de travail effectuées dans l'année, ou un salaire fixe de 500 F. par mois pour le même nombre d'heures de travail. L'une et l'autre proposition reposent évidemment sur la confiance réciproque. Le contrat serait valable pour un an.

Le secrétaire de séance,
J.-P. GUILLOT.

## PHILATELISTES

Les abonnés d'Europe centrale nous paient leur abonnement en timbres neufs. Nous avons à votre disposition de magnifiques séries de Roumanie et de Bulgarie. Pour en recevoir, envoyez un chèque de 10,00 F., 20,00 F., 30,00 F. à :

M. Lucien GILOTEAUX,
3/10, allée Béranger, 59 - Croix
C.C.P. Lille 2 269 89

Nous avons également des diapositives sur Moscou et les musées de la ville. Une série de 20 diapositives contre 20,00 F. au C.C.P. de Kulturaj Kajeroj.

## LES AMIS DE GRESILLON

L'Association Culturelle des Amis de Grésillon a déjà reçu de très nombreuses adhésions. Elle s'est fixé comme premier but d'aider à l'aménagement d'une salle de conférence et de spectacles à Grésillon. Elle accepte tous les dons, même petits.

Adhésion simple : 5 F.

à Association Culturelle du Château de Grésillon
C.C.P. Nantes 2 512 77

## LA REVUE

Nous possédons un certain nombre d'exemplaires de « Kulturaj Kajeroj » des années passées (1960-1971). Les collections complètes sont à votre disposition. Prix de la collection d'une année : 5 F. au C.C.P. de « Kulturaj Kajeroj ».

Merci à tous ceux qui, avant l'été, ont déjà payé leur abonnement. Nous demandons à ceux qui ne l'ont pas encore fait de régulariser leur situation au plus vite. Le nombre des abonnés nouveaux est en progession. Il doit croître encore. Faites connaître « Kulturaj Kajeroj » autour de vous. Merci d'avance.

## MEMBRES BIENFAITEURS (Suite)

| | |
|---|---|
| S-ino Moreau (06) | 15,00 |
| S-ro Bénazet (66) | 15,00 |
| S-ino Askolovitch (75) | 15,00 |
| S-ro Despiney (94) | 20,00 |
| S-ro Villégier (73) | 20,00 |
| S-ino Guillot (74) | 15,00 |
| F-ino Tulasne (49) | 15,00 |
| S-ino Salmon (49) | 15,00 |
| S-ino Lenel (22) | 15,00 |
| F.-ino Duffrène (69) | 15,00 |
| S-ro Smith (Grande-Bretagne) | 15,00 |
| S-ro Mac Lennan (Grande-Bretagne) | 15,00 |
| Laga Stelo (13) | 15,00 |
| S-ro Gennarini (06) | 15,00 |
| S-ino Micard (53) | 30,00 |
| S-ro Vizgirdas (U.R.S.S.) | 15,00 |
| S-ro Massé (73) | 15,00 |
| S-ro Llech Walter (66) | 15,00 |
| S-ro Amouroux (66) | 15,00 |
| F-ino Llech Walter (85) | 15,00 |
| S-ro Fourcade (45) | 20,00 |
| S-ino Montagné (27) | 15,00 |
| S-ino Delisle (75) | 15,00 |
| S-ro Guillaume (78) | 15,00 |
| S-ro Thomas (29) | 15,00 |
| S-ro Capus (34) | 15,00 |
| F-ino Guyon (18) | 15,00 |
| F-ino Charlet (69) | 30,00 |
| S-ro Vidal (63) | 15,00 |
| S-ro Cellier (42) | 20,00 |
| F-ino Duchamps (47) | 15,00 |
| S-ro Brugnier (30) | 20,00 |
| S-ro Van Roye (Belgique) | 15,00 |
| S-ino Jurquet (83) | 15,00 |
| S-ro Vilhelm (59) | 15,00 |
| S-ro Joly-Demol (80) | 80,00 |
| S-ro Guyot (Belgique) | 15,00 |
| S-ro G. Daems (Belgique) | 15,00 |
| S-ro M. Daems (Belgique) | 15,00 |
| S-ino Macé (76) | 15,00 |
| S-ro Angot (17) | 15,00 |
| S-ro Cavelan (06) | 20,00 |
| S-ro Musereau (33) | 15,00 |
| F-ino Levrard (72) | 30,00 |
| S-ro Lautrette (86) | 15,00 |
| S-ino Fabert (77) | 30,00 |
| S-ro Milon (19) | 15,00 |
| S-ro Coulon (25) | 15,00 |
| S-ro Apcher (84) | 15,00 |
| F-ino Lamarca (91) | 15,00 |
| S-ro Hibon (92) | 15,00 |
| S-ro Dupuis (Suède) | 20,00 |
| S-ino Martin (79) | 15,00 |
| S-ro Tragin (27) | 15,00 |
| S-ro Offroy (57) | 15,00 |
| S-ro Jannez (30) | 15,00 |
| S-ro Pigneret (69) | 15,00 |
| S-ro Prévot (44) | 30,00 |
| S-ro Bourquin (25) | 15,00 |
| S-ino Pral (59) | 15,00 |
| S-ro Duval (95) | 15,00 |
| S-ro Correia (Portugal) | 20,00 |
| S-ro Tharreau (72) | 15,00 |
| S-ino Eggers (Allemagne Fédérale) | 15,00 |
| S-ro Schütt (Allemagne Fédérale) | 15,00 |
| Total | 1.155,00 |

## POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

**POR LA PRAKTIKANTOJ**

de **P. Babin**

Prix : **8,50 F.**

**VOUS POUVEZ COMMANDER**

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie.

Adresser commandes et chèques de paiement à :

**MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE**
**49 - Baugé**
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de **5 Fr.**

Demandez notre catalogue.

## NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

**Cours 1er degré.** — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

**Cours 2e degré.** — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

**Cours 3e degré.** — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

### NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

| | |
|---|---|
| Cartes postales de Grésillon : | |
| noires : | 0,40 F. |
| couleur : | 0,50 F. |
| Cuillères de collection : 9,00 et | 12,00 F. |
| Pendentifs : | 7,00 F. |
| Disques de stationnement : | 3,00 F. |
| Etoiles pour vitres de voitures : | 1,00 F. |
| Disque 30 cm avec chansons de Bob Dylan interprétées par le Duo Espera : | 28,00 F. |

et :

**Les Héros Existentialistes**

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 5,00 F.).